Kunlaboro inter UEA kaj SAT, *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, 4-a parto. Labormetodoj de Gaston Waringhien

Claude Gacond, 365-a radioprelego, 1970.10.07 & 10

nCl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En la **Antaŭparolo** al la *Plena Ilustrita Vortaro*, kiun ĵus eldonis SAT, Gaston Waringhien donas informojn pri la labormetodo, kiun li sekvis. Jen unue kion li diras pri la idealo de bona vortaro :

A.- « La idealo de bona vortaro estas respeguli la lingvon uzatan en unu pli-malpli vasta medio kaj en unu pli-malpli limigita tempo.

Cl.- Tio supozigas la konsideradon de du serioj da faktoj : unue la elementoj, kiuj estas herede trudataj de la tradicio [...], due la elementoj, kiuj variadas laŭ la homgrupoj, la epokoj kaj la verkistoj. [...]

A.- Kiam temas pri lingvo internacia – kaj sennacia – kiel Esperanto, la kondiĉoj estas, kvankam multe pli kompleksaj, esence la samaj.

Cl.- La herede trudatajn elementojn liveras la *Fundamento*, kaj la ceterajn elementojn la uzado de la bonaj verkistoj. [...] »

A.- Pri sia tasko Gaston Waringhien diras : « Mia tasko [...] estis duobla: unue prezenti kiel eble plej fidele la donitaĵojn de la *Fundamento*, due esploradi plej zorge la postan literaturon kaj prezenti pri ĝi plej kompletan bildon. [...] »

Cl.- Pri sia laboro li ankoraŭ diras : « Mi penis kolekti plej grandan nombron da ekzemploj tiom el la klasikaj verkoj, kiom el la ĉiutagaj konversacioj, kaj donis grandan spacon al la senc-esploroj de la plej uzataj radikoj. »

A.- Pri la herede trudataj elementoj liverataj de la *Fundamento* jen kia estis la sinteno de Gaston Waringhien :

Cl.- « Principe mi tenis min ĉe skrupula respekto de tiu unika dokumento. Interalie mi ĉiuloke konservis la gramatikan kategorion, en kiu la radikoj aperas en la *Universala Vortaro* : kvankam pri kelkaj el ili oni povas dubi, ĉu alia kategorio ne pli bone akordus kun la uzataj derivaĵoj kaj kunmetaĵoj, mi ne arogis al mi fari tranĉan decidon pri demando, kiun la Akademio sola rajtas kaj kapablas solvi post serioza diskutado. [...] »

A.- Tiu skrupulo de Gaston Waringhien estas por ni garantio, ke tiu nova vortaro ne trudos al esperanto artefaritan evoluon. Tiu vortaro nur celas respeguli esperanton mem, kiel ĝi estas en 1970. En tio ĝi estas scienca verko.

Cl.- Gaston Waringhien memorigas al ni, ke lingvo estas multe pli ol aro da vortoj :

A.- « Lingvo estas multe pli ol nura kolekto da radikoj, kaj ĝi vivas nur en la homa parolo, kiun oni povas kontroli precipe en la skribaj dokumentoj. »

Cl.- Gaston Waringhien refoje trastudis la verkojn de Zamenhof. Jen kion li tiurilate diras :

A.- « Mi relegadis, kun la krajono en la mano, ĉiujn verkojn de Zamenhof, precipe esplorante tiujn, kiuj estis publikigitaj post la dua eldono de la *Plena Vortaro* en 1934, inter aliaj la du volumojn de liaj *Leteroj*, kies eldonon mi provizis, la 4-an volumon de lia traduko de la *Fabeloj* de Andersen [...], kaj la pecojn, lastatempe editoritajn de R. Haupenthal kun rimarkinda diligento. »

Cl.- Gaston Waringhien relegadis ankaŭ aliajn aŭtorojn. Li mencias la nomojn de K. Bein aŭ Kabe, de A. Grabowski kaj de K. Kalocsay.

A.- Koncerne la poezian fakvortaron Gaston Waringhien skribas tion :

Cl.- « Bazon de nia poezia lingvo prezentas la verkoj de A. Grabowski kaj de K. Kalocsay, kaj ilin mi konscience esploradis ; sed ankaŭ la sekvinta florado de nia poezio estis registrinda. Tiucele mi kontrolis ĉirkaŭ 30 poeziajn aŭ artprozajn verkojn el la plej talentaj aŭtoroj, kaj mi esperas, ke tiu parto de mia laboro ne restos senutila, ĉar neniu vortaro, precipe de juna lingvo, estus inda je sia rolo, se ĝi ne ebligus la plenan alireblecon de tia literaturo. »

A.- Sed li aldonas averton, kiu ŝajnas al ni grava :

Cl.- « Sed literaturo estas io, alio estas la komunuza lingvo : tial ĉiun el la tiel kolektitaj novaj vortoj mi markis per aparta signo. »

A.- Ĝi estas la hebrea litero ש [**ŝin**], unua litero de ***ŝir*** (lirika poemo, kiu iel memorigas per sia formo la helenan liron.

Cl.- « Tiu signo, daŭrigas Waringhien, avertas la leganton, ke [la nova vorto] ne estas uzebla en la ordinara parolo aŭ skribo. Neniu prudenta homo uzus en laika konversacio **amaŭrozo** anstataŭ blindeco aŭ **gastropodo** anstataŭ limako, oni same ne uzu **fola** aŭ **linda** anstataŭ frenezeta aŭ beleta ekster la propra beletra tereno. »

A.- Gaston Waringhien enkondukis novajn radikojn, kiuj koncernas la ĉiutagan vivon. Jen kion li diras tiurilate :

Cl.- « Restis la lingvo de la ĉiutaga vivo, ne nur de la viroj, sed ankaŭ de la virinoj kaj de la infanoj, ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ ekster tiu malgranda promontoro de la kolosa Azio.

A.- Ĉi tie min multe helpis la korespondado kun miaj kolegoj M. C. Butler kaj St. La Colla, kiuj proponis plurajn taŭgajn nomojn por la diversaj uzaĵoj de la familia vivo ; pri la orientaj landoj mi profitis el la kontribuo, kiun mia kolego N. Kawasaki afable disponigis al mi, el la *Japana Enciklopedieto* de T. Nakamura, el la tradukoj de ĉinaj aŭtoroj, precipe la *Ĉina Antologio* kaj la *Noveloj* de Lusin ; sed plej konstanta fonto de utilaj tiurilataj informoj estis la diverslandaj gazetoj, el kiuj la pli malgrandaj ne ĉiam estis la malpli fruktodonaj.

Cl.- El tiu stoko da vortoj kaj esprimoj, kies deficiton ni sentas je ĉiu paŝo en la ordinara vivo, mi distingis per aparta signo

A.- (cirklo kun la litero N)

Cl.- la nove enkondukitajn radikojn, ke oni ne uzu ilin blinde aŭ tro abunde : se ili estas allaseblaj en tekstoj destinitaj al jam sperta publiko, ili nepre neniam devus trovi lokon en lerno- aŭ leg-libroj ; en la gazetoj oni almenaŭ klarigu ties sencon ; kaj pri ilia uzado oni ĉiam memoru la saĝan konsilon de Zamenhof : *Ne tro multe, ne tro krude per unu fojo !* »

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: Stefano KELLER, septembro 2012